Li ankaŭ instigis min aliĝi al U. E. A. kaj mi konstatis ke ĝi estas plej taŭga internacia asocio, kiu donas tre efikajn servojn. Ilin mi uzis dum miaj vojaĝoj kaj, fariĝinte s/del. de U. E. A., mi povis fari samajn servojn al la vizitantoj de Paris el kiuj estas miaj amikoj de Bilbao.

Laŭ mia opinio ĉiu Esperantisto ĉiam devas memori ke nia devo estas propagandi por prepari al la venontaj Esperantistoj ebenan vojon sur kiu ili povos antaŭeniri nerenkontante la bariolojn kiujn ni renkontis.

Sed, se U. E. A. estas taŭga asocio pri internacieco, en ĉiu lando oni devas elekti nacian asocion por fari propagandon en la nacio, ĉar ni estas ankoraŭ en la tempo de la propagando, kaj ĉiu Esperantisto eĉ nova, devas nepre aparteni al nacia asocio por helpi kaj subteni la propagandon per sia agado, kaj se eble per la plej grava rimedo; per sia mono.

Konklude mi diros.

Ni ne perdu la kuraĝon. La definitiva triumfo alproksimiĝas, sed por tio oni bezonas monon.

Ni aliĝu al U. E. A. kiel internacia asocio kaj ni aliĝu al nacia asocio por disvastigi nian karan lingvon.

Ĉiam antaŭen kaj VIVU la 2.^a kongreso en Bilbao.

L. GERVOIS

Paris.

OKAZINTAĴO

Iam la Reĝo Alfonso XIII iris al Burgos. Li alvenis posttagmeze al survoja vilaĝo kaj apenaŭ la popolo sciis pri la alveno de Lia Reĝa Moŝto, ĝi rapide plenigis la stratojn de la vilaĝo por lin akcepti kore. La popolo amase volis vidi kaj tuŝi la Reĝon.

La Reĝo akceptis lunĉon ĉe Markizo X., kaj estis invititaj ĉiuj politikuloj kaj ĉefuloj la vilaĝestro kaj la reĝsekvantaro.

La lunĉo forpasis gaja kaj ŝprucata per la bonhumoro de la Reĝo, kiu havis apud si la markizon X. kaj la vilaĝestron.

Tiu ĉi lasta estis vilaĝano kaj, nature, ne tre lerta en altrangaj etiketoj, necesaj por manĝi kun la Reĝo. La markizo volis konfuzi ionete la vilaĝestron. Je la fino aperis la pelvetoj kun akvo por lavi la fingrojn.

La vilaĝestro neniam trovis similan ilon, kaj rigardis ĝin kun scivoleco kaj malkonfido. Rimarkante la markizo tion, li ŝajnekrinkis la varmetan akvon de la pelvo, kaj tio inspiris al la vilaĝestro la ideon trinki la enhavon de la pelvo.

Kaj efektive, antaŭ la mirigitaj kaj ridantaj ĉeestantoj, li trinkis trankvile la akvon destinitan al lavado de la fingroj.

La Reĝo komprenis tuj la situacion kaj rapide li mem trinkis la akvon de la pelvo, ago kiun imitis ĉiuj ĉeestantoj, kiuj aplaudis la veran diplomatan spritecon de la Reĝo.

PEDRO ICAZA.

PETOLA FAKO

Duko Wellington diris al komandanto de la regimento destinita ataki unuavice, proksime de San Sebastian:

—Via regimento estas la unua en tiu ĉi mondo

La oficiro respondis: Certe, kaj ĝi haldaŭ estos ankaŭ la unua en la alia.

Ĉe fotografiisto.

Sinjorino, oni ne plu povas fotografii, estas malfrue kaj mankas lumo.

—Sed ĉu ne estos sufiĉa lumo ankoraŭ por fotografii mian dujaran knabeton?

UNIVERSALA FRATECO

Belega tago! La Naturo, patrino amantega, donas al siaj filoj la pacan kison: la suno disĵetas sur la teron siajn plej purajn lumradiojn. La varmeta venteto de l' printempo disvastigas tra la spaco la aromon de l' floroj; la birdoj flugas tra la ĉiela arkaĵo kaj ili sin banas en lumaj oceanoj; la zumado de miriadoj da insektoj faras sengraŭvan kaj agrablan murmuron; la papilio, flugas

montrante de floro al floro siajn nuancitajn flugilojn; la maro, kvieta kaj trankvila ŝajnas grandega lago. Ĉio estas amo, ĉio estas vivo kaj harmonio ĉe la kreitaĵaro.

Ĉe la luksega festeno de l' naturo estas loko por ĉiuj.

Alkuru vivantaj estaĵoj: ekokupu vian lokon kaj gustumu la nektaron de l' vivo, ĉar la amo donas ĝin al vi per la pokalo de l' frateco. Alkuru vi ankaŭ, kreskaĵoj kaj floroj, arbustoj kaj arboj kaj ĉiuj kreskantaj organismoj. Alkuru kaj laŭdu tiun kin disĵetas sur ĉiujn, tiom da amemo kaj simpatio.

Kaj vi, patrino Naturo, perfektigu tiele miajn sentojn, ke mi povu rigardadi tion, kion miaj neperfektaj organoj ne permesas nin fari nun. Ke miaj okuloj estu milionfoje pli potencaj ol la Reichtera mikroskopo, kaj ke miaj aŭdorganoj aŭskultu la plej sensignifan brueton de l' flugilo plej neperceptebla, kaj tiel mi kantos la pacan kaj harmonian kin regadas sur la planedo.

Ha! Kio estas tio? Mia vidorgano rigardadas ne nur la nebuloson sed eĉ la atomon! Miaj oreloj aŭskultas tre klare la brueton pro la ektaŝo de unu herbo kontraŭ alia. Dankon, Naturo, dankon, kaj lasu min admiri viajn ĉarmojn.

Sed, kion mi vidas? Kion mi aŭdas? Ho, ve! Kia spektaklo! Ĉie bataloj..... militoj..... ekstermoj..... plendoj..... dolorkrioj! Ŝteloj..... mortegoj!..... La visko sin nutras per la suko de l' arboj; la citeno (hipocistido) suĉas la sukojn de la cisto (jara); la kuskutoj absorbas kaj neniiĝas la kreskaĵojn kiuj burĝonas ĉe ilia flanko, kaj siavice, ili interbatalas pro la nutraĵo, kiu estas la sunradio kaj la rosguto. Inter la insektoj, la batalado estas ankoraŭ pli terura kaj miriga. Tutaj specoj estas detruitaj de aliaj, kiuj poste ankaŭ suferas la leĝon de l' venkinto.

Miriga antaŭkoneco provizis la insektojn je ĉiuj imageblaj periloj detruigaj. La pikilo, la preniloj, la boriloj, la beko, la segilo, la hakilo, la glavo. Ĉi tiujn ilojn kaj batalilojn oni donis al ili por ataki kaj defendi sin. Ĉio ĉi tio, kune kun nesatigebla apetito, kruela, blinda, ebligas alsenĉesan bataladon, sen moderigo, neniam ripozante.

Ĉe laflugila regno, la batalo daŭrigas, kaj ĝi estas pli doloriga, tial ke la organismoj estas pli perfektaj. La plej belaj birdoj, tiuj kiuj plej plezurigas nin, kies manĝavideco ne konas limojn, kaj kiuj manĝegas milojn da insektoj, siavice estas manĝegataj de la rabaj birdoj kaj de la rampaĵoj, kaj detruataj de raŭpoj kaj de parazitaj insektoj. En la akvoj, oni ne povas imagi kiel sangavida estas la detruado.

Sur la supraĵo de l' akvoj, same kiel en la plej profundaj internaĵoj, la ekstermo estas la kondiĉo por la ekzistado; same la plej malgranda fiŝo, kiel la baleno, la ventro de ĉiu marloĝanto estas la tombo de aliaj. Persekutoj izolitaĵoj aŭ are, persistaj, konstantaj; ekbataloj teruraj, neklarigeblaj malaperoj; ĉio ĉi tio estas la marvivo.

Inter la kvarpeduloj, la batalo estas pli terura. Kaŝobservadoj, embuskoj, sangmakulitaj dentoj, ... La plej trankvilaj, la herbomanĝantoj, detruas milionojn da mikroskopaj estaĵoj en la vegetaĵoj kiujn ili manĝas; la akvo mem kiun ili trinkas, enhavas milojn da infuzoroj en ĉiu guto. Kaj tiuj aliaj kvarpeduloj, provizitaj je ŝirdentoj por avidmanĝi, je ungegoj por ŝiri, kaj je forto por ataki, kiuj sin nutras per viando tremmova, kaj kiuj enigis plezure siajn buŝegojn en la varmajn internaĵojn de siaj viktimoj, tiuj havas naturan malamikon: la homon.

La homo! Tiu privilegia besto, kies stomako estas la tombo de la kreitajaro; kiu detruas por vivi kaj vivadas detruante; supera organismo, konsistanta el restaĵoj de ĉiuj organismoj; kiu havas potencon, teruran batalilon, la intelekton, armilo kiun li skermas kontraŭ ĉiuj estaĵoj, eĉ kontraŭ siaj similuloj, kovrante per ostoj la planedon, lasante ĉie sangverŝajn postsignojn, ju pli kaŝite li enigis la fatalan armilon en la bruston de siaj similuloj, despli kruela li estas. Kaj ĉitium detruadon, ĉi tiun buĉadon, oni faras sub tiu belega suno, kiu eliras ĉiumatene por rigardadi la kruelaĵojn okazintajn dum la pasinta nokto. Kaj por eksciti per la varmego de siaj radioj la detruantan instinkton de la specoj.

Patrino Naturo, redonu al miaj sentoj ilian antaŭan staton, ĉar terurigas min tio kion mi vidas kaj aŭdas. La tero ensorbigita per sango; la senlima spaco plena je ĝemoj. Kie ajn estas vivanta atomo, tie estas batalo; sed batalo neevitebla, fatala; batalo postulata de la strukturo de la absorborganoj ĉe la kreskaĵoj kaj de tiuj de la

nutrado ĉe la vivantaj estaĵoj, vivinstikta batalo, por kiu la naturo donis al ili ĉiujn necesajn ilojn, kaj kiu daŭras senĉese, sen interpaco ĉar, sen ĝi la vivo ne ekzistus.

Ha! Kia feliĉo! Miaj sentoj, denove restas kiel antaŭe, ... Mia rigardo jam ne penetras en la abismojn de l' vivo! ... Mia aŭdorgano nur aŭskultas harmoniajn sonojn! La gajiga kanto de l' birdo, malpermesas min aŭskulti la ĉagrenan ĝemon de l' insekto; pro la bleko de l' kvarpedulo mi jam ne aŭdas la agonian kanton de l' birdo; kaj la voĉo de l' homo ne permesas aŭdi la blekegon de la mortanta kvarpedulo. Mi kredas denove je la ordo, la paco, kaj la harmonio de l' planedo, kaj mi sentas ĉe mi ion kio min incitas kanti himnon al la universala amo, kiu tremmoviĝas eĉ en la plej malgranda atomo de la kreitajaro.

Vivantaj estaĵoj, kreskaĵoj kaj floroj, arbusoj kaj arboj kaj ĉiuj kreskantaj organismoj, rigardadu la vivon laŭ la vidpunkto kiu vin favoras kaj helpu min kanti ĉi tiun himnon al la frateco kaj amo universalaj.

Esperantigis
EUGENIO LUNATE.

MARIĈU DE OLASKOAGA

Mariĉu de Olaskoaga estis hela floro en forgesita ĝardeno de vaska vilaĝeto. Ŝia bela, blanka kaj delikata vizaĝo, kvazaŭ de virgulino en preĝeja altaro, havis ian neesprimeblan ĉarmon.

Kaj tiel blankaj kiel la vizaĝo estis ŝiaj zorgitaj manoj.

Mariĉu multfoje ilin rigardadis, iom enamiĝinta je tiu ideala blankeco kiu aspektigis ilin kvazaŭ du ekkreskantaj blankaj lilioj.

Dekkvinjara ŝi estis kaj tamen ŝajnis plenaĝa virino.

La soleco en kiu ŝi vivis, eble ŝin igis pensi multe kaj, iom post iom, ŝi akiris tiun malgajan rideton kiun ŝi montris al siaj amindumantoj,

kiam ili dediĉis sentoplenajn frazojn al ŝia sanktigata beleco.

Ŝiaj bluj kaj grandaj okuloj havis ian nedifinitan malĝojon. Kian? La junulino neniam povis respondi al si sian propran demandon kaj fikse rigardante en nedifinitan lokon ŝajnis ke ŝi ploris intime...

La kapfararo religite pendis gracie sur ŝiajn ŝultrojn, kvazaŭ torento orkolorigita de la sunaj radioj.

Silka, nigra kaj simpla vesteto kovris ŝian delikatan korpon.

Tiel la multenombraj admirantoj de ŝia animo kaj beleco vidis ŝin ĉiuvespere leganta versolibron en la antikva domo de Olaskoaga familio.

* * *

Salutis la pastro:

— Belan tagon, Mariĉu.

Ŝi turniĝis malrapide, aŭdinte la mildan voĉon de la pastro kaj respondis:

— Ho, tre bela, tre bela, sinjoro pastro... — kaj ridetis per milda kaj malgaja rideto.

Dum ili ekkomencis simplan interparoladon, multkolora papilio trapasis proksime de la manoj de Mariĉu. Ŝiaj grandaj bluj okuloj ĝin persekutis ĝis kiam, fine el vido malaperis.

La junulino sopiris, dum la Sinjoro pastro daŭrigis la interparoladon.

Estis la pastro tre amika de la Olaskoaga familio, tiel ke lia ĉeesto en tiu loko estis ofta. Ĉiuvespere en sunaj tagoj, kaj eĉ multajn matenojn kiam la suno sin ĝojigis sendante orkolorajn radiojn al tero oni povis vidi lin, promenanta tra la plenfloraj vojetoj de la ĝardeno kiu ĉirkaŭrondis la palacon de la Olaskoaga familio.

Apenaŭ vesperiĝis, pastro iris al la hejmo por internigi en unu el la ĉambrojn, en tiun kiun li difinis kiel bibliotekejo, kaj kie tralegante multfoje la profetajn paĝojn de la Biblio, pasigis belajn spiritajn momentojn...

Li forpasigis milde la tagojn, ne lasante siajn ĉiutagajn legadojn kaj amatajn promenadojn tra la ĝardeno de la palaco.

Tiel, en la vaska vilaĝeto, iom malproksime de la urbaj bruoj, la pastro Kescentzi estis rigardata kiel sanktulo, kaj sankta, vere, li estis.

* * *

Mariĉu ne kuraĝis unue lin demandi, sed poste, antaŭ nobla kaj sincera rigardo de la pastro, demandis al li:

— Sinjoro Kescentzi, respondu min. Ĉu alvenis lĥaki, nia konata atletulo?

— Jes, de antaŭ kelkaj tagoj, kaj alvenis ankoraŭ pli forta kaj bela ol neniam. Ĉu vi rememoras tiun veton faritan de Martin pri la forto de lĥaki? De tiam li famkonatiĝis kaj lia nomo iradas de valo al valo...

Mariĉu respondis:

— Ĝin bone mi rememoras...

Komencis jam la suno malaperi tra la malproksima horizonto nuancita de neprecisaj krespuskaj koloroj.

Alproksimiĝis la mistika horo por la «Angelus'a» preĝo kaj la pastro Kescentzi adiaŭis Mariĉu'n.

* * *

Apenaŭ restinte sola, Mariĉu de Olaskoaga, ripetis silente la vortojn ĵus parolitajn de la Diservanto. lĥaki la atletulo estis proksima de ŝi.

Antaŭ ŝiaj bluj okuloj ekaperis la feliĉo. Tie, en solecaj momentoj ŝi pensis pri li, esperante sekrete la momenton kiam ili ambaŭ unuigitaj antaŭ Dio, trairos la florornamitan vojon de la Feliĉeco.

Kaj nun, kiam post trijara foresto, lin ŝi povos vidi denove, ŝia koro tremas pro la atendata feliĉeco.

Malrapide, Mariĉu stariĝis kaj ekpromenis laŭlonge de unu el la vojetoj de la ĝardeno kie la rozoj pendantaj de la rozujaj branĉoj, disvastiĝis siajn delikatajn kaj bonodorantajn parfumojn.

Sub la foliaro, ŝajnis ke la ĝardeno havis misteran ensorĉon kiu kortuŝis la animon.

Mariĉu etendis siajn neĝoblankajn manojn al rozo. Enspiris la parfumon kaj ĝin lokis sur la bruston, ĉe la koro...

* * *

Apogita sur fenestro kaj rigardanta la belecplenan pejzaĝon Mariĉu enspiris grandplezure la matenajn marventetojn. La suno abunde eniris en la ĉambron, redonante la koloron kiun la bela mistero rabis al ĉiuj estaĵoj. Pendante la bela kapfararo sur ŝultroj kaj dorso, la beleco de Mariĉu montriĝis plene antaŭ la suno. Inter ŝia mano la rozo kiun ŝi tranĉis kaj metis en

sian bruston pasintan tagon, ŝajnis sanga maku-
lo sur neĝo.

Etendinte sian rigardon tra la belegeco de la
kampara pejzaĝo, Mariĉu sentis ke la koro, en
ŝia brusto, forte tremis.

Iĥaki Zuberoa malrapide promenadis tra vojo,
kun vaska ĉapo inter manoj; forta kaj beltalia,
similanta tiujn antikvajn iberojn kiuj loĝis inter
la neniam almlilitaj vaskaj montoj, promenadis
kun suprenlevita frunto, kvazaŭ defiante nevi-
deblajn malamikojn pere de sia atleta brusto.

Mariĉu de Olaskoaga sentis en sia brusto
kreski tiun amon kiun ŝi al neniu konfesis, kiu
iom malfortigita de lia longdaŭra foresto, re-
naskiĝis, plenigante sian malkvietan animon per
feliĉo kaj gajeco.

Alproksimiĝis la atletulo kaj Mariĉu konkludis
ke al ŝi mankis fortoj, eĉ por rigardi lin je
malmultaj metroj. Sed Iĥaki, vidinte ŝin apogita
sur la fenestro de la antikva palaco, akcele iris
al ŝi kaj salutis. Mariĉu emociplena respondis
ridetante.

Kaj ne pli ili interparolis.

Kiam Iĥaki Zuberoa malproksime malaperis,
Mariĉu de Olaskoaga ploris.

Neniam mi povos konfesi ĝin al li... kaj dolor-
plena, pro tiu doloro pri kiu neniu estis kulpa,
la junulino fermis la fenestron tra kie eniris la
orkoloraj sunaj radioj, kvazaŭ ŝi fermus al sia
animo la fenestron de la vivo.

* *

Neniam ŝajnis al ŝi tiel milda. La melodio kium
vira kaj sonperfekta voĉo, kantis en la mistero
de tiu bela kaj silenta nokto.

Haltis subite kaj denove jene aŭdiĝis:

Bijotz bakar bat daukat
ta milla banituz
millak neure maitia
emongo neuskizuz
Eutsi millak langoa
bat, maite neuria
eta neurian ordez
ekazu zeuria

Tiu melodio, kantita inter la triumfantaj du-
nombroj de la baldaŭna nokto, en la malnova
lingvo de Euskalerra (1) kaj tiel sentimentale,
aŭkoraŭ estis pli bela.

(1) (Vaskolando)

Mariĉu avida por senti en sia animinterno la
mildecon de tiu melodio haltigis sian iradon tra
la ĉirkaŭaĵoj de la malnova vaska palaco.

Tiuj horoj kiam la silento estis la reganto, tiu
solamato, tiu kvieteco, ĉio estis revigema. Tial
Mariĉu kaŝe forlasis la hejmon, ĉar eble ŝiaj ge-
patroj ne estus permesintaj al ŝi, eliri sed ĵiel
bone ŝi sin sentis sub la stelplena nokto!

Intertempe la kantado proksimiĝis kaj anko-
raŭ ĉiufoje estis pli milda. La junulino ne at-
entis ke la kantanto estas antaŭ ŝi, ĝis kiam li, ĉe-
sigante la kantadon, per la mistera vaska lingvo
de nekalkulebla aĝo kaj nekonata deveno, al-
sendis al ŝi jenan saluton:

Bonan vesperon, Mariĉu...

Ŝi subite malproksimiĝis, sed kiam lin ŝi reko-
nis ŝi haltis... Estis Iĥaki Zuberoa.

La atletulo, alproksimiĝinte malrapide al ŝi,
diris per milda voĉo:

Tre strange estas vidi vin for el hejmo en
ĉi tiuj malfruaj horoj... Kial?

— Mi tre ŝatas la nokton .. la solecon...

Ŝi paŭzis kaj aldonis per infana voĉo:

— Kiel bele vi kantas, Iĥaki...

— Ne mokridu je mi, Mariĉu...

Ho ne, mi verdiras — Vi kantas tre sente...

Iĥaki Zuberoa ridetis. Por ŝi li kantis; nur por
ŝi li interrompis la noktan silenton ĉe la palaco.

Iom pli ili interparolis kaj timante ŝi ke ŝiaj fa-
familianoj sciu ŝian foriron el hejmo, ili sin
adiaŭis.

Kiam ili sin manprenis ŝi sentis ke lia mano
tremis .. Kaj ankaŭ la ŝia tremetis...

* *

En la hejmo de la Olaskoaga familio ree la
gajeco regas.

Diantpotoj vidiĝas sur ĉiuj fenestroj de severa
aspekto kaj ĉiuloke oni sentas la gajecon de la
vivo.

Mariĉu de Olaskoaga perdis tiun malkvietigan
helecon de sia vizaĝo kaj en ŝiaj grandaj blujaj
okuloj jam oni ne vidis la malĝojon...

Mariĉu de Olaskoaga estas feliĉa...

Ŝi estas la edzino de Iĥaki Zuberoa.

FELIKSO JAUSORO.

REAPARICIÓN

DE

“LA SUNO HISPANA”

Hemos recibido, con gran satisfacción, los números de Enero y Febrero de esta excelente revista de propaganda, redactada, como en su primera época, en español y Esperanto.

La publicación de un órgano como *La Suno Hispana* es de gran necesidad en nuestra patria, y contribuir a que tenga larga y próspera vida es deber de todos los esperantistas españoles.

LA DEKSESA

KARA SAMIDEANARO TUTMONDA!

La Loka Kongresa Komitato de la XVI^a sendas al vi la unuajn salutojn.

El Wien—aŭ Vieno, laŭ ĝia Esperanta nomo—venas la salutoj irantaj tra la tuta mondo ĉiulanden, direktataj al ĉiuj popoloj, kiujn jam atingis la Nova Sento.

La Loka Kongresa Komitato de la XVI^a deziras, ke jam ĝiaj unuaj salutoj renkontu la korojn de la amikoj, plenigante ilin per certeco, ke la salutoj venas el la koroj de la tuta, jam multnombra, samideanaro en Wien.

Jen, la unua kaj plej sincera deziro de la Aŭstruja Esperantistaro: Amikaj rilatoj al ĉiuj partoj de la terglobo, frata kompreno reciproka kun ĉiuj popoloj!

Tia kulturcentro, kia estas Wien, povas ekzisti nur per tiaj principoj. Starante sur tia fundamento vere Esperantisma, la kongresurbo de la XVI^a invitas la tutmondan Esperantistaron, veni Wien'on, kie jam komenciĝis la preparaj laboroj por deca aranĝo, kie oni deziras akcepti la ŝatindajn gastojn ne nur per korega bonveno, sed ankaŭ zorge kreante certecon pri tio, ke la XVI^a en Wien restados valora travivaĵo kaj agrabla rememoraĵo.

Wien, la mezeŭropa kongresejo ĝenerala, pro tio jam sufiĉe estas konata en ĉiu lando civilizita laŭnome, sed ne ĉiam kaj ĉie en la senco konforma al la vera situacio. Tial niaj troveblaj inier ĉiuj popoloj amikoj, kiuj per propra sperto tam konvinkigis pri la unika kvalito de nia urbo

por kongresoj, estas petataj, prediki tiun fakton, al ĉiu, kiu ankoraŭ nenion scias pri la granda trezorejo Wien enhavanta nombregon de valorregajoj artaj, kulturaj, historiaj kaj pejzaĝaj. Kaj niaj amikoj rakontu ankaŭ pri la loĝantaro de ĉi tiu belega kongresurbo, ne superebla de iu ajn alia en gastamo al multgenta fremdularo regule trovebla en Wien.

Do, bonvole akceptu nian saluton, nian koran inviton, venu kaj donu al ni la eblecon, premi vian manon ĉu kiel amiko pro idealaj celoj komunaj, ĉu kiel kunulo pro realaj motivoj.—Anoncu vin tuj kiel aliĝanto al la

XVI^a Universala Kongreso de Esperanto 1924
en Wien-Vieno.

Samideane salutas la

Loka Kongresa Komitato.

Schröder Schade
la prezid. ĉefsekr.

Wien, Januaro 1924^a.

Aliĝo. Ĉiu, kiu pagis la kongresan kotizon, estos registrata kiel kongresano kaj rajtas ricevi kongreskarton kiel legitimacion, krom ĝi insignon kaj kongreslibron, laŭbezone ankaŭ raportojn necesajn por ĉiuj kongresanoj.

Kotizo. La porkongresa laboro kaŭzas sufiĉe grandajn elspezojn, tial la Loka Kongresa Komitato devas peti, ke la samideanoj tre baldaŭ aliĝu kaj tuj pagu la kotizon.—Ju pli rapide vi aliĝos, des pli agrable estos por vi mem kaj por la L. K. K.

Banko. Al eksterlandanoj ni rekomendas, sendi la kotizon simple en registrita letero, aldonante la necesan sumon per monbiletoj aŭ poŝtmarkoj ilialandaj aŭ per bankĉeko; alie ni devus peti pagon per banko en ilia lando al nia kongres-banko en Wien, adreso: Wiener Bankverein, Wien, kun la rimarko: Konto Esperanto-Kongreso Wien.

Vojaĝo. La Loka Kongresa Komitato jam nun interrilatas kun la Aŭstrujaj kaj per ili kun la eksterlandaj fervojaj oficejoj, por ricevi konjuntigan rabaton, kiu malaltigos la vojaĝelspezojn de niaj amikoj.

Pasporto. De la Aŭstruja registaro—ministro por eksterlandaj aferoj—ankaŭ tiurilate jam nun

estas postulita la kutima faciligo koncerne la kongresvojaĝon. Ni treege dcziras, ke la konsuloj sufiĉe frue estu informitaj pri la konsenta decido de nia registaro.

Loĝigo Por kongresanoj ĉiam la loĝigo estas tre grava afero kaj en tiu ĉi direkto la Loka Kongresa Komitato havas vere respondecan taskon. Tial ekzistas en Wien jam nun speciala komitato el fakuloj kun la necesaj spertoj, por prizorgi grandan nombron de ĉambroj taŭgaj por niaj ŝatindaj gastoj. Multaj el ili trovos lokon en diversrangaj hoteloj tute laŭdezure, sed pli multaj povos ricevi litojn privatajn, pagante nur maltaŭ prezon. — Pri

Mangado, same kiel pri la loĝigo, la Loka Kongresa Komitato sendos ankoraŭ precizajn informojn, ĉar precipe ĉi tiuj demandoj devigas al zorga preparo. Sed jam nun ni povas garantii al nia kara samideanaro la tute kontentigan kapablon de nia bonege konata kongresurbo Wien en tiuj rilatoj. Ĉu vi deziras vivi ĉi tie laŭ unuaranga maniero kiel riĉegulo, ĉu laŭ duaranga aŭ eble nur kiel ŝparema vojaĝanto kontentigebla ankaŭ per tre simpla kvalito: vi nur bezonos elektii kaj vi nepre trovos, kion vi serĉis.

Informoj: La konstanta sekretario de la XVI^a jam funkcias. Bezonante iun ajn informon, vi skribu sub la sola kaj simpla adreso: Esperanto-Kongreso, Wien. Specialaj oficejoj kompreneble funkcios dum la kongres-semajno: por vojaĝaferoj, monaferoj, demandoj pri loĝigo k. c. en la kongresejo por la XVI^a koncertpalaco en Wien.

Kongresejo. La plej bela, la plej komforta, la plej taŭga por nia celo palaco en Wien jam estas garantiita por la grandaj solenaj kunvenoj. Domego kun belega akceptejo kaj konvena informejo, kun halo por promenado kaj interbabilado, kun ekspoziciejo, kun tri diversampleksaj salonegoj, kun garderobejoj, kunsido-ĉambroj, restoracio k. c. estos al via dispono. La Kongresejo, meze en la centra parto de la granda urbo, meze inter la ĉefaj vidindaĵoj, meze inter belegaj parkoj kaj grandiozaj muzeoj, proksima al gravaj amuzejoj, certe plaĉos al vi, karaj amikoj, kaj certe vi bedaŭros, kiam vi devos forlasi ĝin, por hejmenvojaĝi.

Kongres-Programo. Pardonu, tre estimataj samideanoj! Eble vi jam hodiaŭ volas scii laŭhore la okazontaĵojn dum nia XVI^a? Ĝuste pri tiu ĉi punkto ni ne raportas al vi ĉi tie hodiaŭ detale, sed tre baldaŭ, post kiam ni eks-

ciis, ke vi estos nia kara, tre ŝatinda kaj tre bonvenonta gasto! —

Sed pri tio ni jam nun devas informi vin, ke la XVI^a komenciĝos la 6^{an} de Aŭgusto, vespere, kaj finiĝos la 13^{an} aŭ 14^{an}. Dum la unuaj 3 tagoj la ĉefa tasko estos la laboro por Esperanto, la lastaj 3 tagoj estos ĉefe amuzigaj, kaj en la mezo troviĝos granda, publika, serioza manifestacio por Esperanto. — Speciala celo de la L. K. K. estos, interkonsente kun la K. K. K., bone gardi pri vere internacia kaj neŭtrala karaktero de la dekseza Kongreso.

Fakaj Konferencoj ankaŭ estos aranĝataj, sed nur, kiam ekzistas personoj gvidantaj por ili, kiuj povas garantii vere seriozan laboron de tiaj konferencoj, iutensan preparon, preskaŭ la sukceson mem de tia konferenco. Jam nun estas certaj multaj fakaj konferencoj, precipe de: Blinduloj, Fervojistoj, Framasonoj, Instruistoj, Junuloj, Katolikoj, Komercistoj, Kuracistoj, Policistoj, Poŝtistoj, Teknikistoj, Teosofoj, U. E. A.-Delegitoj k. c. — Organizoj, kiuj havas socialan, politikan, pacifistan aŭ alian, ne tute neŭtralan programon, devas entrepreni konferencojn aŭ kongresojn memstare kaj tute aparte, ne kunligante ilin kun la XVI^a. — Oni postulu de la L. K. K. la «Instruiciaron» por aranĝantoj de fakkonferencoj.

Helpo. Kara XVI^a-ano, vi mem ankaŭ povas kunhelpi, por certigi iurilate la dezirindan sukceson de nia Wien'a Kongreso. — 1^e Vi tuj aliĝu! — 2^e Vi atentigu amikojn en diversaj landoj, kun kiuj vi korespondas, ke ili ĉiuj nepre veturu al la XVI^a Wien'on, ĉu unuope, ĉu karavane, se tiu aranĝo estos ebla. — 3^e Vi uzu la propagandomarkojn de la XVI^a, por ke ne estu unu homo en la tuta vasta Esperantujo, kiu ne scias pri nia XVI^a. — 4^e Vi subskripciu por la Garantia Kapi^o, talo de la XVI^a iun sumon sendangere, ĉar laŭ la ĝisnunaj spertoj tiurilataj via garantia mono tute ne, aŭ almenaŭ ne tute, t. e. nur proporcie, estus postulota. — 5^e Vi simple donacu iun sumon al la kaso de la XVI^a. — 6^e Vi raportu al la vialandaj jurnalaj pri la aranĝo de la XVI^a Universala Kongreso de Esperanto en Wien dum Aŭgusto 1924^a. — Jen, elektu, samideano; vi povas helpi multmaniere!

Do: Aliĝu tuj vi mem, varbu amikojn kaj subtenu iomete la grandan laboron de la L. K. K!

FRANZ J. SCHADE.

LITERATURA KONKURSO

DE LA

"DUA IBERIA KONGRESO EN BILBAO"

Unua temo. -- Originala prozaĵo beletristika, konsistante el minimume 2 000 vortoj. Temo laŭvola.

Unua premio 100 pesetoj. Dua premio 50 pesetoj.

Dua temo. -- Traduko de la ĉapitroj 8.^a kaj 9.^a, -1.^a parto en la gravega verko «Don Quijote de la Mancha».

Unua premio 100 pesetoj. Dua premio 50 pesetoj.

NOTOJ KLARIGAJ

I. La verkoj prezentataj devas esti verkitaj en Esperanto.

II. La aŭtoroj de la premiitaj verkoj ricevos belan diplomon kaj enkadrigitan portreton de Doktoro Zamenhof.

III. Ĉiuj verkoj devas esti skribitaj tre legeble, mane aŭ maŝine, kaj porti «moton» aŭ pseŭdonimon de l'aŭtoro; la nomón oni devas sendi en fermita koverto sursignita per la sama «moto» aŭ pseŭdonimo.

IV. Ĉiuj verkoj devas esti sendataj al «Comité Organizador del 2.º Congreso de Esperantistas Ibéricos», Merced, 1, Bilbao (España).

V. La lasta templimo por ĉiuj verkoj estas la 1.^a de Junio 1924.

Lista de donantes para los gastos del 2.º Congreso

	Pesetas
<i>Suma anterior</i>	1.738
D. Fernando Krug	25
» José Santamaría	10
» Roberto Maraury	20
» Enrique Muñoz	25
» Pedro Infante	5
» José Velasco Ealo	10
» Mannel Arteaga	3
» Félix Bilbao Eguileor	5
» Victoriano Revuelta	4
SUMA EN 29 DE FEBRERO ..	1.845

Además se llevan recaudadas para el Capital de Garantía, pesetas 325.

Envíese el adjunto boletín, acompañado de su importe, al *Comité Organizador del 2.º Congreso de Esperantistas Ibéricos*, calle de la Merced, 1, Bilbao. El pago puede efectuarse en sellos de correo de 5 o 25 céntimos.

BOLETIN DE INSCRIPCION

D. Profesión

Pueblo Provincia solicita ser inscrito

en el SEGUNDO CONGRESO DE ESPERANTISTAS IBÉRICOS, enviando adjunto, al efecto, e correspondiente importe de 5 pesetas.

..... de de 1924.

Nombre y apellidos

Domicilio (bien legible)

Inscripciones hasta el 29 de Febrero

N.º	1	D. Andrés Piñó, Valencia.	N.º	20	» Francisco Icaza Gangoiti, Bilbao.
»	2	» Félix Diez Mateo, Bilbao.	»	21	» Francisco Crespo, Bilbao.
»	3	» Manuel Elezcano, Bilbao.	»	22	» Teodoro Elizondo, Bilbao.
»	4	» Luis de Otaola, Bilbao.	»	23	» Julio Belenguer, Teruel.
»	5	» Juan Gracia, Bilbao.	»	24	» Benigno de Luna Gómez, Madrid.
»	6	» José Velasco Ealo, Bilbao.	»	25	» Santos Pascual, Bilbao.
»	7	» Félix Jausoro, Bilbao.	»	26	» Juan José Larrea, Bilbao.
»	8	» Pedro Ulaortúa, Deusto.	»	27	» Juan de Ajubita, Bilbao.
»	9	» Irineo Birigay, Bilbao.	»	28	» Isidoro Acha, Bilbao.
»	10	» Roberto Maraury, Salamanca.	»	29	» Rómulo S. Rocamora, Barcelona.
»	11	» Fernando Krug, Bilbao.	»	30	» Pedro Manchovas, Bilbao.
»	12	» Félix Bilbao Eguileor, Bilbao.	»	31	» Francisco González, Bilbao.
»	13	» José Santamaría, San Sebastián.	»	32	» León Gervois, París.
»	14	» Roque Martínez, Bilbao.	»	33	» Ricardo Villalba, Bilbao.
»	15	» Eugenio Lunate, Baracaldo.	»	34	» Julián de Maguregui, Bilbao.
»	16	» Juan Muro, Bilbao.	»	35	» Patricio Llano, Baracaldo.
»	17	» Eugenio Herrera, Bilbao.	»	36	» Andrés San Pedro, Baracaldo.
»	18	» Manuel Maynar, Zaragoza.			
»	19	» Pedro Icaza Gangoiti, Bilbao.			

Detondu la suban aliĝilon, kaj ĝin sendu, akompanata de ĝia sumo al la Organiza Komitato de l' 2.^a Kongreso de Iberiaj Esperantistoj, Merced, 1, Bilbao. Oni akceptas poŝtmarkojn de 5 aŭ 25 centimoj.

ALIĜILO

S-..... Profesio

Urbo Provinco petas sian enskribon por la

DUA KONGRESO DE IBERIAJ ESPERANTISTOJ kaj sendas ĉi-kune, por tiu celo la sumon de
5 pesetoj.

de de 1924.

Bapto-kaj familia nomo

Loĝejo: (skribu klare).

Esperantista Centra Librejo, 31, rue dd Clichy, Paris

**Eldonejo de la
Verkoj de D-ro L. L. Zamenhof**

kiujn ĉiu Esperantisto devas legi.

Petu Katalogon! — Cefaj verkoj aĉeteblaj:

Fundamenta Krestomatio, entenanta la «Ekzercaro» (el la «Fundamento de Esperanto»), «Fabloj kaj Rakontoj», «Artikoloj pri Esperanto», «Poezioj»; unu dika libro 460-paĝa, Franc. Frankoj 8. — *Georgo Dandin*, komedio en tri aktoj de Molière; unu libro grandformata, 3. — *Hamleto*, tragedio en kvin aktoj de Shakespeare; unu libro mezformata, 3. — *Ifigenio en Taŭrido*, dramo en kvin aktoj de Goethe; unu libro grandformata, 6. — *Proverbaro Esperanta*, laŭ la verko «Frazeologio rusa-pola-franca-germana» de M. F. Zamenhof (1232 proverboj); unu libro grandformata, 3. — *La Rabistoj*, dramo en kvin aktoj de Schiller; unu libro grandformata, 4. — *La Revizoro*, komedio en kvin aktoj de N. V. Gogol; unu libro grandformata, 4. — *Fabeloj de Andersen*. Plena kolekto; unua libro grandformata, 6. — *La Rabeno de Baĥara*, romano de H. Heine. *La Gimnaziano*, monologo de Šalon Alajhem; unu libro grandformata, 3.

PRI CERVANTES

**KAJ LIA FAMKONATA VERKO
"EL QUIJOTE"**

Interesa verketo tradukita el ĉeĥa lingvo.

Sendata per poŝto,
por 50 centimoj

MAGIO

Teatraĵo por infanoj
POR LA SAMA PREZO

Petu ambaŭ verketojn aĵ
GRUPO ESPERANTISTA
str. Merced, 1 **BILBAO**

**"ESPERANTO
TRIUMFONTA"**

SEMAJNA GAZETO

ELDONATA EN KOLN-HORREM

AKIREBLA EN BILBAO:

JURNALKIOSKO DE L'ARENAL

(APUD LA PONTO)



SELLOS DE PROPAGANDA

SE REMITEN POR CORREO

España y Portugal 0,40 ptas. el 100

Otros países 0,50 » » »

PÍDANSE AL

GRUPO ESPERANTISTA
MERCED, 1 BILBAO

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO (U. E. A.)

Centra Oficejo: 12, Boulevard du Théâtre, Genève (Svislando)

U E A celas:

- Disvastigi la uzadon de la internacia helplingvo Esperanto.
- Plifaciligi la ĉiuspecajn moralajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj sen diferenco pri raso, nacieco, religio aŭ lingvo.
- Krei internaciajn servojn uzablaj de ĉiuj homoj, kies intelektaj aŭ materiaj interesoj celas trans la limojn de ilia genta aŭ lingva teritorio.
- Kreskigi inter siaj membroj fortikan ligilon de solidareco kaj disvolvigi ĉe ili la komprenon por fremdaj popoloj.
- La Asocio estas neŭtrala rilate al religio, nacieco aŭ politiko.

U E A konsistas:

- El sesmil membroj diverslandaj.
- El centoj da Delegitoj kaj Vicdelegitoj en la ĉefaj lokoj, kiuj respondas la informpetojn de la membroj kaj helpas ilin okaze de vojaĝo.
- El Komitato, elektita de la Delegitoj, el Central Oficejo, el teritoria organizo ktp.

U E A laboras:

- Por konstrui centron de esperantista agado bone ordigita kaj forta. Konsiderante, ke internacia organizo estas necesa al lingvo internacia la lasta kongreso oficialigis U E A kiel la tutmondan organizaĵon de individuaj esperantistoj.
- Por faciligi al siaj membroj la praktikan uzon de la lingvo kaj favorigi esperantan korespondadon, turismon, komercajn rilatojn, ktp.
- Por konatigi la valoron de nia lingvo ĉe interŝtataj oficejoj, grandaj internaciaj societoj, ktp. La sukceso de tiuj klopodoj multe dependas de la nombro de la personoj en kies nomo la Asocio rajtas paroli.

U E A donas:

- Al la anoj Membrokarton kaj ducentpaĝan jarlibron kun la adresoj de la Delegitoj, esperantistaj grupoj, gazetoj, organizaĵoj, kun sciigoj pri internaciaj rilatoj ktp. Ĉiu membro deziranta korespondi aŭ interŝanĝi rajtas presigi dufoje sian adreson en la gazeto «Esperanto» aŭ speciala aldono.
- Al la Membro-Abonantoj: La gazeton «Esperanto», internacia ĉeforgano de la esperantistoj, kun artikoloj literaturaj, sciencaj, teknikaj kaj precizaj informoj pri la movado.

U E A postulas:

- Jaran kotizon de 6 pesetoj por Membro, de 15 pesetoj por Membro-Abonanto kaj de 30 pesetoj por Membro-Subtenanto.

Konkludo:

- Uzu la lingvon kiun vi lernis por ke via kono portu fruktojn.
- Memoru la universalan celon de Esperanto. Membreco ĉe nacia societo estas necesa sed ne sufiĉa.
- Aliĝu al U E A, kiu interkonatigos vin kun aliaj samideanoj, faciligos viajn internaciajn rilatojn kaj reprezentas la generalajn interesojn de la Esperantismo.